



Novjorka Prismo

Numero 142

Marto 2005

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia marto kunveno

DATO: Vendredon, la 18-an de marto 2005, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Thomas Eccardt prelegos pri:
La stranga historio de la Esperanto-movado en Novjorko. ★

Protokolo de la kunveno de la 18-a de februaro 2005

Precize je la sepa horo, Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon kaj bonvenigis ĉiujn. Stuart memorigis nin pri pago de la societa kotizo por la jaro 2005. Li diris, ke kiu ankoraŭ ne pagis, tiu povas sendi al Sonja SOSKINA sian kotizon kune kun la verda slipo enkovertigita kun ĉiu *Prismo*.

Ĉeestis 18 personoj ĉe la kunveno, inkluzive nian preleganton.

La protokolo de la januara kunveno estis akceptata. Sekvis kelkaj anoncoj. Unue, Rochelle F. GROSSMAN montris artikolon, kiu aperis la 8-an de februaro en *New York Times*. La titolo de la artikolo estis "At a Bustling City Clinic, Esperanto Would Come in Handy" (Esperante: "En urba kliniko plena de agado, Esperanto estus oportuna"). La artikolo estis verkita de kuracisto Danielle OFRI kaj priskribis la malfacilecon de komunikiĝo kun unu el siaj pacientoj, kiu ne scipovas la anglan. Malgraŭ la titolo, la teksto de la artikolo ne menciis nian lingvon. Tamen Rochelle esprimis la esperon, ke ĝi pensigos la publikon pri Esperanto kaj pri la lingva

problemo en mult-lingvaj situacioj.

Due, Tomaso ECCARDT, subredaktoro de nia bulteno *Novjorka Prismo*, petis pardonon pro la malfruco de ĝia dissendo en februaro. Li diris, ke li kaj Jim MEDRANO klopodos pretigi ĝin pli glate en venontaj monatoj.

Tomaso anoncis poste, ke lia nova kurso de Esperanto baldaŭ komenciĝos post la fino de la nuna kurso. Interesatoj estis invititaj kontakti lin pri ĝi.

Maki SANO diris, ke ŝi serĉas prelegantojn. Ŝi petis, ke iu, kiu volas prelegi pri io ĉe venonta kunveno, kontaktu ŝin pri tio.

Fine, Sonja SOSKINA anoncis, ke ŝi povas provizi informon al interesatoj pri la Baltaj Esperantaj Tagoj, kiuj okazos la venontan someron en Riga, Latvio, ĉirkau la tempo de la UK en Vilnius, Litovio.

Post la anoncoj, dum paŭzo antaŭ la alveno de nia preleganto, la grupo aŭskultis plurajn amuzajn anekdotojn legitajn kaj rakontitajn de Tomaso, Sonja, kaj Stuart.

Je la 7:50-a horo alvenis nia preleganto

Susan POLGAR. S-ino Polgar estas la plej alte rangita ŝakistino en la mondo, kaj la unua grandmajstrino en la historio de ŝako. Ŝi fondis kaj estras la Polgar Chess Center (Polgar-a Ŝakocentro, www.polgarchess.com) en Forest Hills, Queens.



S-ino Polgar kreskis inter esperantistoj kaj estis aktiva kun sia familio en la E-movado dum sia juneco en Hungario.

Ŝi prelegis al ni angle, sed respondis senhezite kiam ni faris demandojn Esperante. Ŝi parolis pri sia vivo kaj sia kariero en ŝako, pri la fondo de sia Ŝakocentro, pri la agado de ĝi, kaj pri siaj celoj por ĝi.

Post la prelego s-ino Polgar afable faris aŭtografojn por kelkaj el ni kaj sidis por pluraj fotoj kun nia grupo.

Fine, je la naŭa horo precize, Stuarto formale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE



Societanoj de ESNY kun nia gasto Susan Polgar (meze) dum la februara kunveno.

